

Nikolaus Lenau,

## Al la fora amatino

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Tiun rozon plukas mi  
En forega tia',  
Ŝatus porti ĝin al vi  
Karulino mia.

Sed ne estos mi ĉe vi,  
Antaŭ ol velkinta  
Estas rozo, kiun mi  
Estas detranĉinta.

Plu ne iru iu for,  
Iu hom' amanta,  
Ol en man' portata flor'  
Restas plu floranta;

Aŭ ol flugas najtingal'  
El la nesto ien,  
Aŭ ol sonas en la val'  
Ĝia kanto ĉien.

*Traduko de la Germana poemo "An die Entfernte" de NIKOLAUS LENAU (\*1802-08.13 - †1850-08-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).*

*Arg-626-1266 (2012-10-26 12:08:28)*

*Pri la poeto viud la retejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/Nikolaus\\_Lenau](http://eo.wikipedia.org/wiki/Nikolaus_Lenau).*